NIA VOĈ_O
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur po_ta adreso)
Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodriguez San Pedro 13-3°-7
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JULIO-AŬGUSTO 1998

*Nia Voĉo estas legebla en internet _ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto*

## HISPANIO

Augusto Casquero, kun aliaj 15 esperantistoj el 14 landoj, kandidatiĝis por UEA B-komitataneco. La individuaj membroj povos elekti siajn 8 reprezentantoj en la Komitato de UEA por la periodo 1998-2001.

La nova eldono de "Lexicon Sopena" estas la 4-a libro pli vendita ĉe UEA-libroservo (209 ekzemplerojn)

Hispana Esperanto-Muzeo de Sant Pau d'Ordal ricevis 600 guldenojn de "Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen"

Alava-E-Asocio festas sian dekan datrevenon. Al tiu ronda cifero aldoniĝu multaj nuloj!. Ĝi apartenas al Eusko-Esperantpo-Asocio: Zapatería 29. E-01001 Vitoria-Gasteiz.

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

Memoru ke Manuel Pancorbo zorgas pri la publikaj rilatoj, li bezonas ricevi sufiĉe antaŭe la novaĵojn por sendi al naciaj amas-medioj. La Grupoj povas sendi iliajn novaĵojn al loka kaj regionaj medioj. Uzu jenan elektronikan poŝton <liven@nexo.es> . Manuel parolis pri esperanto, dum 15 minutojn, en la madrida loka televid-stacio "Canal 23"

La 15-an de decembro la usona novaĵakanalo CNN dediĉis iom pli ol du minutojn al esperanto
Manuel Pancorbo estis

ABC 98-06-16 José Luis Garci en artikolo pri futbalo diras: "La esperanto de la verda ekrano (TV) estas unu el la plej bonaj medicinoj por trapasi limojn...." Kelkajn tagojn poste la teamoj de Usono kaj Irano kune fotiĝis kaj subskribis pacon.

Sendube esperanto sonas en Valencio, "Tip", kiu loĝas en Valencio, en la programo "Protagonistas" ĉe Onda Cero, rakontante humoran fabelon petis al unu el rolulo paroli esperanon. Bedaŭrinde li en rags nian lingvon kaj parolaĉis.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

1a Apud-Mara Kultura Esperanto Semajno 25-30 julio. Valencia
54-a Internacia Junulara Kongreso (TEJO). Rijeka (Kroatio) 25a julio 1a aŭgusto.
83a UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto
84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999

## ESPERANTO EN "INTERNET"

E-adreso de la Grupo NIFO, eldonanto de la scienfikciaj libroserioj "Sferoj", "Orbito nula" kaj "Future": <gruponifo@esperanto.nu>

La 83-a Universala Kongreso de Montpeliero havas T3-ejo kiu enhavas la Unuan kaj Duan Bultenojn: www.mygale.org/10/univkong

Sveda E-Federacio ekfunkciigis je la adreso www.esperanto.se/nun/enhavo.html, la elektronikan bultenon "Nun", kiu celas esti "la plej rapida informilo de la e-movado"

"Kajeroj el la Sudo" Bulteno de HALE (Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj): www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm

Revuo "El Popola Ĉinio". www.china.org.cn

Billy, komputila ludo en Esperanto povas esti senpage akirebla en demo-versio ĉe www.esperanto.dk/billy

## DAEWOO SUBVENCIAS E-LIBRO

Laŭ sugesto de UEA kaj Korea E-Asocio, la Daewoo-Grupo subvenciis la esperantan eldonon de la libro "Vastas la mondo, multas laboro" de Kim Woo-Choong, fondinto kaj prezidanto de Daewoo. Ĝi estas la 24a plej granda entrepreno en la mondo. Inter esperantistoj ĝi estas konata i.a. pro la markoj "Espero" kaj "Cielo" de la automobilo Daewoo. Danke al la subvencio la profito de la vendado iros al Kampanjo 2000 de UEA.

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79

Membro el la Eŭska Parlamento (IU-Los Verdes) kontaktis HEF-ejon. Pere de esperantisto laboranta ĉe parlamentejo li ekciis pri esperanto. Li ĉefe scivolis pri oficialaj dokumentoj agnoskantaj iel esperanton, de UNESKO, Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Konsilantaro. Ŝajnas ke li klopodos se la Eŭska Parlamento oficiale agnosku la "Manifeston de Prago". Ankaŭ li interesiĝis pri eldonado de turismaj broŝuroj kaj instruado de Esperanto. HEF havigis al li la dokumentojn kaj materialojn petitaj kaj plu restas en kontakto.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Memoru ke dum Julio ankaŭ ni kunvenos lunde je la 18.30h ĉe HEF
RODRIGUEZ SAN PEDRO 13×-3º7
Tel. 91 446 80 79.

EKSTERLANDE

Julio 24-29 "Lorca kaj la hispana poezio ĉi-jarcenta " Miguel Fernández gvidas seminarion ĉe Kvinpetalo, Bouresse (Francio) . Dank'al la laboro de Miguel, kiu skribis diversaj artikoloj en esperantaj revuoj, la centjariĝo de la naskiĝo de Federico García Lorca estis amplekze rezencita en la esperanto movado. Kelkefoje la artikoloj estis uzita por skribi pri Lorca en naciaj lingvoj.

LASTA INFORMO PRI la APUD-MARA KULTURA ESPERANTO-SEMAJNO

Valencio 25-a ĝis 30-a de julio

Jam aliĝis 100 partoprenantoj el 9 landoj. Okazos kurso de esperanto laŭ Csch metodo. Jadwiga Gibczynska prezentos du teatraĵojn. Folklora prezentado de 50-persona pola ensemblo, Diversaj prelegoj en Esperanto. Ĉeesto al la spektakloj de la "Foiro de Julio". Gigantan "paella" kun "sangría" senpage por la ĉeestantoj.

NIA VOĈO DISTRIBUADO

Legu nur se vi havas ruĝan signalon ĉi-tie □

Pro la altigo de la kosto de fotokopioj kaj poŝtmark-prezo ni nur sendas nian revuon al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis regule kotizon kaj hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Se vi deziras ricevi nian inform-folion_vi devas sendi 1.000 pesetojn (Vi povas sendi bileton en koverto je nia nova adreso).

PER BICIKLO AL SANTIAGO

La Grupo de Bilbao organizos biciklan karavanon la duan semajnon de Aŭgusto el Burgos ĝis Santiago (600 km, 7-10 tagoj) Informoj 944 16 44 92; <tepgaitj@lg.ehu.es>

KORESPONDA KURSO

HEF organizas, je nacia nivelo, koresponda kurso (poŝte kaj pere de internet, laŭ la libro "El esperanto: curso de la lengua internacional". La materialo inkludas librojn, ekzercojn vortaron kaj kasedon. Prezo: 14.900 ESP. Pago: remburse aŭ pere de bank-konto Caja Postal nº 14.011.966, je la nomo de Federación Española de Esperanto

ESPERANTO LICEO DE MADRID
San Alejandro 6-4ºB. Ext
28005 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal